# ATEISMO

**BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO**




**Novembro 2021**

N-ro 33 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

La 11an de septembro ĉi-jare la mondo solene memorfestis la 20an datrevenon de la ŝokega kvarobla teroratako en Usono. Preskaŭ 3000 homoj mortis en la tago de tiu atako, kaj kelkmil en la sekvaj jaroj pro malsanoj ligitaj kun ĝi. La plej granda teroratako en la historio estis farita de junaj arabaj anoj de la islamisma teror-organizaĵo Al-Kaida, kies ĉefa bazo estis en lando regata de islamismaj ekstremistoj.

La kovrilo de tiu ĉi numero petas nin imagi mondon sen religio, inspirite de anglalingva frazero en la fama kanto de John Lennon "Imagine" (Imagu), mondon kie la Ĝemelaj Turoj ankoraŭ starus. La datreveno de la atako ja estas bona okazo por demandi, ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca loko sen religio. Tiucele, ni invitis la membrojn de ATEO dividi siajn opiniojn kun la aliaj legantoj de la bulteno. Do en la unua sekcio "Ateisma Vivo", vi trovos kelkajn kontribuojn pri tiu ĉi temo.

Oni povas argumenti, ke la mondo ja estus pli bona, pli paca sen religio, ĉar ĝi apartigas homojn kaj naciojn, ofte kaŭzas sangajn konfliktojn kaj ankaŭ subpremadon kaj persekutadon. Kristanismo kaj islamo ambaŭ disvastiĝis kun abunda sangoverŝado. Certe la granda plimulto da religianoj estas pacaj kaj tiras komforton el religio. Kaj ni ŝuldas al religio multe da artaj kaj arkitekturaj belaĵoj, kaj ankaŭ diversajn bonfarajn agadojn kaj instituciojn. Sed la dogmemo kaj netoleremo de religiestroj kaj la strebado por potenco fare de ili kaj de regantoj uzantaj religion rezultigis – kaj ankoraŭ rezultigas – persekutadon kaj militadon.

La mondo alfrontis en la lastaj jardekoj ondon de islamisma terorismo, kies apogeo estis la monstra atako de la 11a de septembro. Estis dubinde ĉu pro iu ajn alia kialo krom religio, grupo da fanatikuloj farus tian abomenaĵon. Ili agis kiel batalantoj en tutmonda ĝihado, kiu celis la "kafiran" (nekredantan) Okcidenton, speciale Usonon, kies fervora subteno por Israelo certe estis aparta instigo ataki ĝin. Aliflanke, verŝajne granda parto de la viktimoj estis mem kredantoj diversreligiaj, kvankam toleremaj, pacemaj. Okazis telefonvoko inter pasaĝero sur Flugo 93, unu el la kaperitaj flugoj tiun tagon, kaj telefonisto – ili kune recitis la preĝon "Patro Nia". Tio estis montrita en televid-filmo pri la flugo. Tian religiecon en tia momento, oni povas plene kompreni kaj simpatii.

Ĉi-somere nelonge antaŭ la 20a datreveno de la atako, la Talibanoj sukcesis rekonkeri Afganion. Estis ĝuste ili, kiuj gastigis Al-Kaida en la jaroj 1996-2001 kaj sub kies protektado Bin Laden gvidis la planadon de la atakoj. Do, estas nekredeble, ke la internacia komunumo permesis al ili reakiri ŝtat-potencon kaj denove trudi per teroro sian fundamentisman formon de islamo. Tamen disvolviĝas nuntempe tre interesa fenomeno en Mezoriento, kiel montras du tekstoj en tiu ĉi numero: la disvastiĝo de nereligieco kaj eĉ ateismo. Do estas espero, ke tiu regiono iam sekulariĝos kaj plipaciĝos.

# ATEO denove kunvenis virtuale sed vigle

Kiel en 2020, ATEO organizis du virtualajn kunvenojn ĉi-jare, sed ĉi-foje ili okazis la saman semajnon – dum la Virtuala Kongreso de Esperanto, 17-24 julio. Bedaŭrinde, la UK denove devis esti nuligita pro la pandemio. Do oni anstataŭe organizis la VK, kiu same kiel la unua pasintjare, estis sukcesa, kun riĉa programo kaj multaj eblecoj babili rete.

Unue, ATEO prezentis sin dum la Movada Foiro. Sed malkiel en la fizika foiro, kiam kongresanoj mallonge vizitas unu asocian tablon post la alia, trafoliumante materialojn kaj babilante kun la asociaj reprezentantoj, en la virtuala versio de la ATEO-tablo, ŝajnis, ke vizitis ĉefe ATEO-membroj kaj aliaj ateistoj kaj liberpensantoj, kiuj restis la tutan horon aŭ grandan parton de la horo. La sekretario de la asocio, Anna Lowenstein, faris varb-celan prezenton de ATEO uzante la ilon PowerPoint. Ŝi parolis pri la diversaj terminoj uzataj de nekredantoj (ateisto, humanisto, liberpensulo ktp) kaj metis kelkajn demandojn, alvokante al tiuj, kiuj respondis jese aliĝi al la asocio. Lige kun tiuj ĉi temoj kaj la difino de ateismo mem estis vigla diskuto. Kadre de tiu prezento, la redaktoro parolis pri tiu ĉi bulteno, montrante apartan mallongan prezentaĵon per PowerPoint. Ĉirkaŭ 30-35 personoj ĉeestis la kunvenon.



"Paco kaj konfido: universalaj valoroj"

Nur du tagojn poste, okazis publika kunveno de ATEO. Kiel en ĉiu tia kunveno, estis ĉefa temo, kiu ĉi-jare estis nesurprize "Ateismo kaj la pandemio". La ĉefpreleganto Orlando Raola, profesoro pri kemio en Usono, kaj eks-prezidanto de Esperanto USA, en sia prezento emfazis la neceson alvoki al racia kaj scienca gvidado dum la pandemia krizo por trovi solvojn al la tutmonda virusa katastrofo. Li kritikis religiulojn en Usono, kiuj proklamas, ke la pandemio estas dia volo: puno por samseksemo, abortigoj kaj aliaj laŭ ili malmoralaĵoj. Kaj li ankaŭ kritikis la rifuzon de multaj akcepti la konsilojn de sciencistoj, la manipuladon fare de iuj politikistoj, kiuj nomas la viruson fi-ĉina kreaĵo, kaj la decidojn de la usona Supera Kortumo renversi

malpermesojn kontraŭ diservaj renkontiĝoj ordonitaj de iuj ŝtatoj, kio signifas, ke la rajto kunveni por religiaj celoj estas pli grava ol publika sano.

La dua preleganto, la redaktoro de la bulteno, argumentis, ke dum la kvanto da kovidaj kazoj kaj mortoj kreskadas kaj okazis ĝis nun kelkaj ondoj de la malsano, religioj montriĝis senpovaj. Ĉu Dio kaŭzis la pandemion aŭ intence ne haltigas ĝin (do, ekzercas "dian volon"), ĉu Dio ne kaŭzis kaj ne kapablas haltigi ĝin, preĝado estas senutila en ĉiuj kazoj. Kiel menciis Orlando, iuj religiuloj asertas, ke la pandemio estas dia puno, tamen aliaj asertas, ke Dio protektas ilin de la viruso. Sed religio ne nur senutilas, ĝi ankaŭ malutilas ĉar religiaj ariĝoj tutmonde disvastigis la viruson. Klare, scienco estas la sola rimedo por batali kontraŭ la viruso. Multaj kredantoj ja scias tion: la Papo mem vakciniĝis kaj en multaj preĝejoj distancigado kaj maskuzado estas devigaj.

Entute pli ol 50 personoj ĉeestis la kunvenon, kaj en la pinta momento partoprenis 44 homoj. Estis interesa, vigla diskutado post la prezentoj, kiu daŭris en la neformala babilejo post la oficiala kunveno. La organizantoj de la VK disponigis multajn babilejojn en la programo, kaj kelkaj estis aparte destinitaj por ateistoj – tuj post la du ATEO-kunvenoj kaj ankaŭ en aliaj periodoj.

*Teksto preparita de la redakcio de Ateismo.*




*Bildo el la prezentaĵo pri ATEO*

# Ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca sen religio?



**Luís Ladeira (Portugalio)**

Por respondi ĉi demandon necesas respondi antaŭe aliajn demandojn: Kio estas religio? Kiel kaj kial rilatas bono/malbono kaj paco/malpaco al religio?

"Aro da ritoj laŭ kiuj la homoj klopodas altiri protekton de superulo". Jen religio!

Ĉu ĉi difino sufiĉas por prezenti religion? Historie ne, sed filozofie jes. Historie, ĉiam miksiĝis tiuj respektegaj kaj petegaj ritoj kun kondutaj reguloj (moralo) kaj moroj prezentitaj kiel la volo de superulo mem rilate al homoj. Filozofie evidentiĝas, ke ĉiuj homoj bezonas moralon kaj morojn por vivi en socia etoso, eĉ se ili ne kredas je superulo kaj ne respektas ĝin, kio signifas, ke moralo kaj moroj ne apartenas al la religia esenco.

Do, historie, kiam oni parolas pri religio, oni parolas pri aro da respektegaj/petegaj ritoj kaj samtempe aro da reguloj pri la homa kunvivado, ĉar ili prezentiĝas nedisigible de la superulo mem. La bono aperas kiel tio, kio plaĉas al la superulo, kaj la paco kiel tio, kion la homoj meritas pro sia obeo al superula volo. Male, pro malobeo venas milito kaj malsano, sume la malbono.

Do, ni klopodu respondi al la ĉefa demando: ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca loko sen religio? El la filozofia vidpunkto la respondo estas ne, ĉar akcepti superulon kaj peti ĝian protekton en si mem ne endanĝerigas la mondon. Nur la postulado de specifaj moroj kaj moralaj reguloj kiel la dia volo, kaj la superulo mem kiel

la ununura dio, kapablas endanĝerigi la mondon, ĉar tio kontraŭas aliajn praktikojn/kredojn kaj sekve kreas militeman etoson.

Eble la mondo efektive estus malsama se ne miksiĝus religio kaj moralo/moroj, kvankam restus aliaj kialoj por fari militon…

Eble la mondo efektive estus iom pli paca kaj bona se la homoj, eĉ religiemaj, akceptus la deklaracion pri homaj rajtoj kiel manieron orientiĝi en socia etoso.

## Franciska Toubale (Aŭstralio)

Unue necesas difini kion oni celas per la vorto religio: ĉu la penssistemon kaj kredon de iu individuo aŭ ĉu institucion kun ties hierarkio kaj dogmoj. Religio kiel organizaĵo estas kvazaŭ politika partio, kiu celas potencon. Vojo al povo estas riĉeco, do tiuj organizaĵoj ankaŭ celas akiri riĉecon. Kompreneble ne eblas akiri kaj povon kaj riĉecon sekvante la etikan konduton priskribitan en la religio. Tio kondukas al maltoleremo, al sektismo, al perforto. Historio estas plenplena de tiuj sangaj konfliktoj je la nomo de religio. Fakte ne estas io ajn religia en "religiaj" militoj. Estas nur maniero distingi la partoprenantojn. Pluraj ŝtatoj provis eviti tiajn konfliktojn per divido inter politiko kaj religio. Religio estu nur individua elekto. Tamen estus naive pensi, ke religio same kiel internaciaj kompanioj ne influas politikajn decidojn. Komence oni devus fermi la religiajn lernejojn kaj universitatojn, por ke religio ne plu intervenu en la ŝtata vivo.

En la kazo de individuo, religio povas alporti al li/ŝi respondon rilate la kreadon de la mondo, instigon konduti etike ene de familio, komunumo aŭ pli vaste homaro, komforton dum malfacila periodo. Mi ne konas religion, kiu ne postulas lojalecon, amon por la vero, bonfaradon kaj kompaton. Iu ajn, kiu sekvas tiujn rekomendojn kontribuas al paca mondo kaj harmonia kunvivo. Bonfaraj organizaĵoj ofte estas religiaj. Ili provizas senlaborulojn aŭ senhejmulojn per manĝaĵoj, vestaĵoj aŭ rifuĝejoj. Dum la pandemio ili helpis multajn homojn.

Sed konscienco ne naskiĝis kun religio. Ĝi estas homa trajto, necesa por kunvivi kiel eble plej pace. Eblas montri kompaton ktp al aliaj homoj, sen la apogo de religio, simple kiel membro de la homaro.

Homoj bezonas senti sin interne de komunumo. La pandemio kaŭzis altiĝon de mensaj malsanoj pro izoleco. Se ili bezonas dion por etike rilati kun aliaj homoj, estu tiel, kondiĉe ke tiu religio ne fariĝu potenco, kies celo estas daŭrigi sian potencon. Homoj renkontiĝu por simple kunesti aŭ kune preĝi, same kiel homoj kuniĝas por ludi ŝakon aŭ muzikon por la plezuro kune praktiki komunan intereson, por senti sin feliĉaj. Kun aŭ sen religio, homoj restas estaĵoj ambiguaj, kapablaj je bono kaj malbono. Kiel diris, laŭ la tradicio, Pascal: "Homo estas nek anĝelo, nek besto, kaj kiu volas fariĝi anĝelo, fariĝas besto".

## Aharon Davidzon (Israelo)

Kompreneble mondo sen religio kondukus al forigo de motivoj por konfliktoj inter popoloj pro la ekzisto de malsamaj religioj. La homaro pagis altan prezon pro religio. Povas esti listigitaj pluraj el la plej gravaj sekvoj:

*La socia prezo:* La etnocentrismo de ĉiu religio, kiu estas konsiderata pli alta ol aliaj, kio kondukas al disvastigo de rasismo, naciismo, kaj diskriminacio kontraŭ virinoj.

*La ekonomia prezo:* La elspezoj farataj de religiaj institucioj rilate al konstruado de preĝejoj, sinagogoj, moskeoj kaj religiaj lernejoj, kaj al eldonado de religiaj libroj, kaj ankaŭ la donacoj ricevitaj de kredantoj kaj aliaj, estas grandegaj. Ĉi tiu mono povus esti uzata por konstrui publikajn lernejojn kaj hospitalojn, por sciencaj esploroj ktp.

*La psikologia prezo:* La enpremado en la mensojn de la sennombraj kredantoj de limoj pri individua, socia kaj seksa konduto, kaj la fermado de la ebleco de libera pensado kaj racia konduto.

## Pino Lalli (Italio)

Ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca sen religio? Historio instruas multe pri tiu temo. Cetere religio simbolas apogeon de egoisma agado fare de individuoj, triboj, komunumoj kaj nacioj por peti por si mem apartajn favorojn al Dio kiel sanon, longan feliĉan vivon surtere kaj enĉiele.

La armeoj uzis pastrojn por ricevi dian helpon kontraŭ la malamikoj. (Ĉu ankaŭ tiuj ne estas fratoj kaj filoj de la Eternulo?) En la nomo de Kristo aŭ Mahometo aŭ alia oni fiplenumis abomenajn krimojn. Eĉ la fama filozofo Sokrato estis mortkondamnita pro ofendo al dioj, kiujn li ne agnoskis. La hispanaj armeoj kun religia komforto pereigis sudamerikajn popolojn. Kristanoj organizis krucmilitojn kontraŭ la islamaj nekredantoj. Mahometo logis militistojn promesante al tiuj, kiuj mortos en batalo, ke ili ĝuos paradizon. La romkatolika eklezio eĉ starigis eminentan aparaton de persekuto: inkvizicion, per kiu ĝi klopodis forigi ĉiun provon de herezo. Ignaco Lojola estis sanktigita pro sia agado kontraŭ la Maŭroj, kiujn li amase mortigis. La sama romkatolika eklezio petadis dum jarcentoj la intervenon de fremdaj armeoj por akiri kromajn teritoriojn kaj pligrandigi la Papan Ŝtaton. En Vatikano, la nuna Papo Francisko, memorante la dubindan sorton de Papo Johano Paŭlo la 1a kaj timante minacojn kontraŭ sia vivo, manĝas ĉiam en komuna manĝejo.

Mi opinias, ke religio utilas por kaŝi niajn sekretajn nedireblajn instinktojn pri subpremado de diversuloj, uzurpado de alies propraĵo, trudado de propraj ideoj kaj hipokriteco. Per religio la vero estas distordita, la faktoj misprezentitaj, la naturaj valoroj malŝatataj.

Kiel povas deveni de religio io bona por atingi pacon por ĉiuj?

## Katja Lödör (Belgio)

Ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca loko sen religio? Vere interesa demando.

Religio estis ĉiam maniero por plivastigi potencon, por havi regadon super la popolo, por malebligi ke homoj iĝu kritikemaj kaj pensu memstare. Do neklereco de granda parto de la popoloj estas parte la sekvo de religioj. La riĉa parto de la popolo ĉiam subtenis la religion kaj sekve la religiaj potencoj reciproke helpis krei la diferencojn inter riĉuloj, mezklasuloj kaj malriĉuloj.

Militoj ĉefe rilatas al la deziro je potenco kaj riĉaĵoj. Pro la fakto, ke la plejmulto el la religiaj ĉefrolantoj ankaŭ aspiras al potenco kaj riĉaĵoj, la religio ludis rolon en militoj. Sed mi ne estas konvinkita, ke la mondo estus pli paca sen religio. Religio estas maniero por manipuli la homojn. Ĝi povas do esti uzata en ambaŭ sencoj, ĉu por pacaj, ĉu por militaj.

Paca mondo nur eblas se ekzistas pli da egaleco, pli da eblecoj ekkoni unu la alian, pli da kunlaboro pri celoj, kiuj utilas por ĉiuj. Edukado ludas gravan rolon por akiri mondon de paco. Edukado por solidareco, amikeco kaj psikologia bonfarto. Grave laŭ mi estas ke homoj konsciiĝu, ke bonfarto ne kreiĝas pro havemo kaj strebo al ĉiam pli da riĉaĵoj. Bonfarto kreiĝas kiam homoj sentas sin akceptataj de la aliaj, kiam ili sentas, ke aliuloj interesiĝas pri ilia bonfarto.

La nuna pandemio kaj la ekologia krizo povas estis instigo al pli solidara mondo. Tamen se la homo restas egoista besto, mi dubas ĉu ĝi sukcesos vivi en paca mondo.

## Dominique Vasconi-Couturier (Francio)

Laŭ la sanktaj libroj de multaj religioj, kaj laŭ la eldiroj de pastroj, religia leĝo utilas por helpi la homojn agi bone kaj saĝe. Jam de pli ol dudek jaroj, la homaro eniris la 21-an jarcenton. Antaŭe, okazis multaj militoj, kaj eĉ post la Dua Mondmilito regis la timo pro la "malvarma milito", kaj la terura potenco de atomaj armilaroj.

Onidire, iu verkisto anoncis dum la 20a jarcento, ke "la 21a jarcento aŭ estos religia aŭ ne okazos". Kvankam ŝajnas, ke André Malraux neniam diris tion, aŭ ne ekzakte tiel (1), tia frazo montras, ke persistas en iuj mensoj la ideo, ke religio povas malhelpi konfliktojn aŭ malbonojn.

Oni scias, ke dum la estinteco, la religioj kaŭzis amason da militoj, murdoj ktp. Nur en Francio, de la albigensoj (2) ĝis la protestantoj, la katolika religio okazigis multajn krimojn. Pro tio, kaj ankaŭ pro aliaj kialoj, en Francio oni faris leĝon en 1905 por disigi la ŝtaton de la religia povo. Dank'al tio, ni francoj transiris sufiĉe longan periodon (t.e. kelkaj jardekoj) kun malmultaj religiaj konfliktoj en la lando. Dum tiu periodo, la religiaj diferencoj ne tre gravis ankaŭ pro la fakto, ke malpli da homoj kredis kaj praktikis. Mi povus paroli pri la

ŝanĝoj okazintaj dum la lastaj jardekoj pro la enmigrado de arabaj islamanoj (islamo troviĝas nun en la dua loko ĉe ni), sed mi ne deziras verki tro longe.

Tamen dum en la plej riĉaj landoj nemalgranda parto de la loĝantaro malproksimiĝis de la religioj, kredo en iuj dioj daŭras en multaj partoj de la mondo. Por diri la veron, la teraj loĝantoj, kiuj kredas je iu dio (aŭ iuj dioj), estas pli multnombraj ol tiuj, kiuj ne zorgas pri tio.


Memorante, ke kredantoj estis (estas) subpremataj, persekutataj, foje murdataj tra la mondo (en Tibeto kaj aliaj partoj de Ĉinio, en Barato, en Mjanmao ktp.), oni povus opinii, ke religioj estas plagoj por la homara sekureco kaj por la paco.

Sed, atentante la kialojn de tiuj malbonaĵoj, oni oftege trovas, ke la origina kialo ne estas "nur" religioj, sed la uzo de tiel nomata "religio" fare de politikaj respondeculoj kaj klerikoj kun malnoblaj intencoj. La kredantoj estas manipulataj; ili koleras, molestas, mortigas precipe pro manko de edukado kaj malkapablo pri racia analizado.

Dume, en la riĉaj palacoj de la Tero, en la mondo de potenculoj, hinduoj, islamanoj, kristanoj kaj nekredantoj zorgas pri siaj gravaj aferoj: kreskigi sian potencon, akiri pli da posedaĵoj, mono, ktp. La "dio" de la nuna tempo ne estas en la "ĉielo", sed, en la diskoj de komputiloj kaj en Wall Street kie oni aĉetas kaj vendas dum ono da sekundo. Ni devas liberiĝi de tiu ĉi premfonto, ne nur de iamaj superstiĉoj.

(1)https://www.dicocitations.com/questions-reponses/question/qui-a-dit-le-xxieme-siecle-sera-spirituel-ou-ne-sera-pas/

(2)Ano de religia komunumo de la 12–14a jc en Langvedoko, Francio, konsiderata hereza de la Katolika Eklezio



# Tiel mi fariĝis ateisto

*Soile Lingman (Finnlando)*

Dum la Dua Mondmilito mi estis unu el la 70 000 finnaj militinfanoj, kiuj estis senditaj al paca Svedio. Mi loĝis kvin jarojn ĉe sveda kamparana familio. Tie oni instruis al mi preĝi mian vesperan preĝon kaj viziti preĝejon dimanĉe.

Post la milito mi revenis al mia familio en Finnlando. La postmilita tempo estis mizera, kun manko de mono kaj manĝaĵoj. Mia patrino estis grave malsana kaj mi ne plu scipovis paroli kun ŝi en la finna lingvo. Sed mia patro estis Esperantisto, socialisto kaj pacisto. Mi feliĉe heredis tiujn ideojn de li.

Sed dum jaroj mi daŭre ĉiuvespere preĝis, ke Dio resanigu mian patrinon kaj donu al ŝi iom da espero. Dio ne aŭskultis min. Iun matenon mia patro trovis, ke mia patrino mortis dum la nokto. Post tiu tago mi ne preĝis eĉ unu preĝon. Mi perdis mian infanan kredon je iu supera, bona forto, nomata Dio.

Tiel mi fariĝis ateisto.



# La Holokaŭsto igis ŝin ateisto

*A. Voino (Germanio)*



*Hitler renkontiĝas kun altrangaj katolikaj eklezianoj*

Abraham estis rabeno en Berno jam de kelkaj jaroj. Kiam li edziĝis al Ĥava, pola virino, kiu eĉ ne parolis la germanan, tio estis vaste prikomentita en la komunumo, ĉar la jida alvenis en ĉefe bone asimiliĝinta socio. Sed finfine Ĥava estis pia juna knabino kaj ŝi certe sciis kiel ludi sian rolon. Kaj la rabeno devis edziĝi kaj havi familion. En 1924, kiam naskiĝis ilia filino, ili nomis ŝin Ester. Kaj ili edukis ŝin kiel bonan judan knabineton.

Kiam Hitler estis elektita kanceliero de Germanio, la situacio por svisaj judoj ne ŝanĝiĝis. La homoj ne tre ŝatis ilin, sed ili ĝuis absolutan sekurecon. Ĉi tio ne ŝanĝiĝis, kiam multaj rifuĝintoj komencis veni al Svislando. Rifuĝintoj, kiuj alportis multe da mono estis aparte bonvenaj. Tamen, kiam la Dua Mondmilito komenciĝis, la svisaj limoj fermiĝis kaj la situacio de eŭropaj judoj fariĝis kriza.

En 1943, Abraham ricevis permeson de la nazioj iri al Strasburgo, por reporti iujn gvidantojn de la alzaca komunumo al Svislando. Sed tuj kiam li alvenis, li estis arestita de la Gestapo. Kaj li estis for por ĉiam. Post la milito oni eksciis, ke li mortis ĉe Aŭŝvico.

Lia filino Ester, tiutempe 19-jaraĝa, decidis, sen diri al iu ajn, iri al Strasburgo por trovi sian patron, pri kiu neniu plu aŭdis. Kiam ŝi alvenis al Alzaco, iuj membroj de la komunumo prizorgis ŝin kaj kaŝis ŝin dum kelkaj monatoj. Bedaŭrinde ili estis perfiditaj de najbaroj kaj arestitaj de la Gestapo.

Ester estis deportita al la koncentrejo Bergen-Belsen. Kiam la brita armeo liberigis la koncentrejon, ŝi estis tre malsana, sed ankoraŭ vivanta. Ŝi ŝuldis sian supervivon nur al tio, ke ŝi estis juna kaj bonfarta, ĉar en Svislando oni ne spertis malsaton kiel en aliaj landoj de Eŭropo.

Post la milito ŝi translokiĝis al Alzaco por trakti la tuberkulozon, kiun ŝi alportis de Bergen-Belsen. Ŝi ne plu kredis je Dio, konvinkita, ke se li ekzistus, li neniam permesus la Holokaŭston. Ŝi, kiu germane parolis ekde la naskiĝo, de tiu momento rifuzis paroli tiun lingvon ĝis la fino de sia vivo kaj konsentis paroli nur la francan.

Komunikado kun ŝia patrino Ĥava estis tre malfacila, ĉar Ĥava ne parolis eĉ unu vorton de la franca kaj cetere neniam pardonis ŝin, ke ŝi forlasis Svislandon dum la milito. Kiam kelkajn jarojn poste, Ester, kiu mem fariĝis patrino de tri infanoj, rekomencis kontakton kun sia patrino, ili provis akordiĝi, sed novaj fontoj de konflikto aperis. La nepoj estis edukitaj rigore ateisme kaj havis neniun scion pri judismo. Krome ilia patro estis gojo. Estis tro multe por vidvino de rabeno. Ĉar la germana lingvo estis malpermesita interne de la familio, Ĥava parolis la jidan kun la infanoj kaj precipe kantis al ili la tradiciajn kantojn en tiu lingvo.

Kiel vi eble komprenis, Ester estis mia patrino. Ŝi rakontis al mi ĉion ĉi, jarojn poste, kiam mia avino jam delonge estis morta. Mi estis 25-jara kaj decidis translokiĝi al Germanio kiel muzikisto. Mi dankas ŝin, ke ŝi ne malpermesis al mi fari tion kaj mi konscias, kiom tio certe kostis al ŝi.

Antaŭ ol publikigi ĉi tiun tekston, mi petis permeson de miaj fratinoj. Ili donis ĝin al mi kondiĉe ke mi ŝanĝu ĉiujn nomojn. Tion mi faris.



# PRIPENSIGOJ

## La dilemo de liberala kristana teologio



*La katedralo de Worcester, Anglio*

Liberalaj teologoj dediĉas sin al la tasko fari kristanismon akceptebla al la kritika menso. Per "senmitigado" kaj "biblia ekzegezo" *[kritika interpretado – Red.]*, ili provas ĝisdatigi tradiciajn doktrinojn de la fido, tiel forigante konfliktojn inter racio kaj fido. La liberalo pretendas doni al ni ekvidon de la "vera" signifo de la biblia rakontado – sed tio ne tro similas al la kristanismo konata de dudek jarcentoj.

Liberalaj protestantoj senhezite agnoskas la nefidindecon historian de la Biblio; fakte, estas plejparte ili, kiuj respondecas pri la severa dissekcado de la Biblio kiel laŭfakta fonto per la evoluigado de "alta kritikado". Se la Evangelioj ne estas traktataj kiel "historiaj kronikoj", ĉu tio signifas, ke la vereco aŭ malvereco de la Biblio ne rilatas al la vereco de kristanismo?

Ni devas memori, ke kristanismo havas historion, kiu amplekas dudek jarcentojn. Dum tiu tempo, krom eble en la lastaj jardekoj, kristanoj difinis sin surbaze de tio, kion ili kredas esti vera. Kristanoj kredas je specifa tipo de dio, kaj kredas, ke Dio revelaciis sian volon al la homaro per la Biblio – kiu inkluzivigas la doktrinojn de infero kaj la releviĝo.

La malakceptado de tradiciaj doktrinoj fare de liberalaj teologoj ampleksas nekredon je la laŭvorta releviĝo de Jesuo; tio estas mito – kvankam mito kun signifo kaj graveco. Se temas pri la infero, ĝi estas priskribita sufiĉe vivece en la Nova Testamento, kiu ne provas kaŝi la teruran sorton, kiu atendas nekredantojn. Tamen malofte oni aŭdas liberalajn protestantojn diskuti la sorton de nekredantoj. Se liberaluloj neas la ekziston de la infero, ili devas klarigi kial kristanismo estas tiom grava, ĉar ne plu ekzistas io de kio oni devas esti "savita". Se ili agnoskas ĝian ekziston, ili devas akordigi egan kruelecon kun io, kio estas reprezentata kiel religio de amo kaj kompato.

La liberala teologo estas kaptita en dilemo. Kiel klerulo kaj filozofo, li estas supozeble dediĉita al intelekta honesteco kaj la serĉado por la vero – sed kiel teologo, li estas dediĉita al la defendado de kristanismo. Filozofio celas la malkovron de la vero, dum teologio okupiĝas pri la defendado de specifa aro da kredoj. Kristana teologo provas forigi kontraŭojn inter la asertoj de fido kaj racio per interpretado.

La problemo de racio kaj fido dependas de la vereco de la kristana kroniko, t.e. la Biblio. Se oni agnoskas, ke la Biblio entenas faktajn malpravaĵojn, el ateisma vidpunkto, estas nenio plu por argumenti. Teologo povas "interpreti" laŭvole, sed li neniam povos refuti ateismon. La ateisto argumentas, ke kristanaj doktrinoj konfliktas kun la racio kaj devus esti forĵetitaj; la liberala teologo, aliflanke, argumentas, ke kristanaj doktrinoj konfliktas kun la racio kaj estas modifendaj. Sed tio ĉi simple distordas kristanismon kaj ne akordigas racion kaj la kristanan fidon.

*Fragmento el la anglalingva libro Atheism: The Case Against God de George H. Smith (eldonita en 1974) tradukita kaj adaptita de la redakcio de Ateismo.*

# Pri religio, moralo kaj moroj

*Luís Ladeira (Portugalio)*

*"Kiam la temo leviĝas, mi prezentas mian opinion, sed ĉiam donas al la kontraŭulo la eblecon ´savi sian vizaĝon´ kaj mi pretas agnoski, ke tra la jarmiloj religioj estis potencaj iloj por plibonigi la mondon, kvankam nun indas konservi la valorojn (ne mortigu, ne ŝtelu, amu vian proksimulon, ktp) sed forgesi pri la fabeloj."*
Renato Corsetti, Ateismo 32

Ĉu vere religioj estis tra jarmiloj potencaj iloj por plibonigi la mondon?

Ni serĉu respondon, sed unue ni demandu nin pri tio, kio estas religio. Ĉu moralaj valoroj kaj moroj apartenas al religio? Fakte ili ĉiam miksiĝis en ĉiuj tradiciaj religioj, tamen...

Moralo memstaras sen religio. Sufiĉas atenti pri nereligiema homo. Ĉu "ŝli" estas senmorala? Certe ne, ĉar "ŝli" vivas en socio, kiu estas la nesto de la morala vivo. Same pri moroj.

Do, kio restas al religio? Nur tio, kio esencas al ĝi, t.e. ritoj koncernaj al adorado de supera(j) estulo(j), kiu(j) prizorgas la mondon. Tiuj ritoj celas peti helpon al superulo(j). Do, dia kulto. Ne pli!

Miksi dian kulton, moralon kaj morojn en religia unuiĝo: tio fiksas la homojn en praa epoko, kiam la plej gravaj el la mondaj religioj ekestis. Tiam moralo kaj moroj iĝis dia volo, sed ili fakte fontis el socia etoso.

Ĉu kontribuo por plibonigi la mondon? Certe ne, kiam la priskribo estas "ne deziri la edzinon de virproksimulo same, kiel oni ne deziru lian sklavon, nek lian beston". Certe ne, kiam ĝi postulas nuligi la socian rolon de la virinoj per subpremaj reguloj. Certe ne, kiam ĝi postulas mortigi malfidelulojn. Kaj tiel plu…

Ĉu valoras reliefigi la socian rolon de la religio? Kian rolon? Kunligi homojn por laŭdi "potenculon" petante helpon? Certe jes, se tiu ago ne kontraŭas la homajn rajtojn, kiuj mem postulas religian liberon, inkluzive de nereligiemo.

Sekve, en demokratio oni defendu religian liberon postulante, ke la religioj akordiĝu kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu, siaflanke, spegulas la nuntempan socievoluan staton de la homaro. Tia agordo signifas elpurigi la religiojn je moralaj reguloj, kaj moroj, kiuj kontraŭas la homajn rajtojn; kaj alĝustigi la interpretadon de aliaj.

Male, permesi religian mastrumadon nekontrolante ties moran kaj moralan regularon malfortigas kaj endanĝerigas la demokration. Tio certe ne plibonigos la mondon.

Kompreneble se dio ne ekzistas, oni ne bezonas religion. Sed tio estas ateisma konkludo, kiun oni ne rajtas trudi al kredantoj. Eĉ pro tio, ke ĝi estus kontraŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.



*Pilgrimado de katolikaj flagelantoj | Hispanio 2018 | (zgrados.com)*

# Kreskanta nereligieco en la araba mondo

*Nyegosh Dube (Pollando)*




*"Fiera esti ateisto" en Mekko (Fonto: Qantara.de)*

La ĝenerala impreso pri la islamaj landoj de Mezoriento kaj Nordafriko estas pri regiono, kiu estas ege religiema, socie malmoderna, kaj agresema kontraŭ alikredantoj. Tamen unu el la plej rimarkindaj fenomenoj nuntempe (certe por ni ateistoj) estas la kreskanta malakceptado de religio kaj fortiĝado de sekularismo en la araba mondo, kaj ankaŭ en Irano kaj Turkio. De Sauda Arabio al Maroko okazas granda transformiĝo en sociaj sintenoj rilate al religio (specife islamo) kaj la pozicio de islamo en la socia kaj politika vivo. La ŝanĝo estas senprecedenca – neniam antaŭe en la araba mondo troviĝis tiom altaj niveloj de sekulareco. Kvankam la absolutaj niveloj estas ankoraŭ plejparte malaltaj, la kresko de nereligieco kaj ateismo en la lastaj jaroj estas impona.

Du interesaj enketoj aperis en la lastaj du jaroj, unu pri la araba mondo fare de Arab Barometer (AB), publikigita en 2019, kaj alia pri Irano, publikigita en 2020. Tiu ĉi artikolo precipe diskutos la rezultojn de la AB-enketo, aldonante informojn el diversaj retaj fontoj. Aparta teksto en tiu ĉi numero prezentos la rezultojn de la alia, ĉar ili estas speciale interesaj montrante mirigan nivelon de civitana sekularemo en oficiale teokratia ŝtato.

Ni komencu per la plej ĝenerala rezulto rilate al la 11 landoj (inkluzive de la Palestinaj Teritorioj) kie AB faris sian enketon, nome ke inter 2013-2014 kaj 2018-2019, okazis kresko de 61% (de 8% al 13%) en la nombro de araboj, kiuj konsideras sin nereligiaj. La afero fariĝas pli interesa kiam oni rigardas unuopajn landojn. En Tunizio duobliĝis la nereligiuloj, de 14% al ja impona 31%; en Libio okazis iom pli granda kresko, de 11% al 25%; en Maroko kaj Egiptio triobliĝis la nereligiuloj, sed al ankoraŭ malaltaj niveloj, al 13% kaj 10% respektive; en Alĝerio, la kresko paralelis la ĝeneralan rezulton, de 8% al 13%. Bedaŭrinde AB ne povis fari la enketon en Saudio kaj aliaj Golfaj ŝtatoj, tamen raportoj ja indikas kreskojn de nereligieco ankaŭ en tiu regiono.

La ciferoj estas eĉ pli interesaj se temas pri homoj malpli ol 30-jaraĝaj. Iliakaze, la ĝenerala kresko estis de 11% al 18%, kresko de 63%. Sed en Tunizio mirinde preskaŭ duono (47%) de sub-30-jaruloj nomas sin nereligiaj, kio estas iomete pli ol la 46% de iliaj samaĝuloj en Usono. Sufiĉe rimarkindaj estas la ciferoj ankaŭ en kelkaj aliaj landoj: ĉirkaŭ triono en Libio, kvarono en Alĝerio, kaj kvinono en Egiptio.

La kresko de nereligiuloj okazas kadre de pli vasta ŝanĝo, nome liberaliĝo en la socio, kio tamen plejparte ne estas spegulita en la registaroj kaj religiaj instancoj, kiuj restas konservativaj kaj netoleremaj. Ankaŭ multaj ateistoj/agnostikuloj daŭre nomas sin islamanoj, prezentas sin kiel sekularajn, progresemajn islamanojn aŭ kiel islamajn reformemulojn. Estas plena gamo de ŝanĝoj ligitaj kun religia kredo kaj praktiko: virinoj, kiuj forigas la hiĝabon, kaj homoj, kiuj ne plu preĝas aŭ preĝas nur vendrede – sed ambaŭkaze daŭre restantaj islamanoj; tiuj, kiuj malakceptas religian dogmon, ritecan praktikon, preferante pli individuan, spiritecan formon de religio; dum ankoraŭ aliaj ŝanĝas sian religion aŭ fariĝas agnostikuloj aŭ ateistoj (plejparte sekrete).

La kreskon de nereligieco kaj ateismo akompanas kaj parte instigas falo de fido je islamismaj partioj kaj religiaj gvidantoj, kaj pliiĝanta malakceptado de miksado de religio kaj politiko. Laŭ AB, subteno por islamismaj partioj en la enket-landoj falis de 35% en 2013 ĝis 20% en 2018, dum fido je religiaj gvidantoj falis de 51% al 40%. La "Araba Printempo" de 2011 unue rezultigis fortigon de islamismaj partioj, sed poste okazis vasta seniluziiĝo pro ilia malkompetenteco kaj koruptiĝemo. Krome, ekaperis grandskala abomeno kontraŭ sangoverŝaj islamaj ekstremistoj kiel ISIS kaj kontraŭ la diversaj enlandaj militoj, kie konfliktoj inter religiaj sektoj (nome sunaistoj kaj ŝijaistoj) ludis gravan rolon. La politikigo de islamo (kaj la islamigo de politiko), la uzo de ŝtata potenco por trudi malmodernajn religiajn devojn kaj punojn, kaj ekstremistaj kruelaĵoj: ĉiuj puŝas multajn en Mezoriento kaj Nordafriko forlasi islamon aŭ almenaŭ postuli reformojn kaj modernigon.


Malgraŭ la pozitivaj evoluoj priskribitaj ĉi-supre, la situacio restas ege malfacila por tiuj, kiuj publike deklaras sian ateistecon aŭ ŝanĝas sian religion aŭ simple alvokas reformojn

por modernigi islamon, pliigon da kred-libereco, aŭ malpliigon da intermiksiĝo de ŝtato/politiko kaj religio. Preskaŭ ĉiuj arabaj ŝtatoj traktas islamon kiel la ŝtatan religion, kaj la plimulto havas leĝojn kontraŭ apostazo kaj blasfemo, kaj ne akceptas nereligiecon kiel identecon kontraste al religia identeco. Arabaj registaroj kaj religiaj instancoj sentas sin minacataj de ateistoj kaj aliaj liberpensuloj. Apostazo, kiu signifas publikan forlason de islamo, ĉu por aliĝi al alia religio aŭ fariĝi senreligia, estas mortpunebla en kelkaj arabaj landoj, kvankam pli ofte oni enkarcerigas por tiu ĉi "krimo" kiel ankaŭ por blasfemo – tamen foje islamismaj ekstremistoj mortigas homojn, kiuj forlasas aŭ kritikas islamon.

En 2013, juna bloganto en Sauda Arabio, Raif Badawi, estis kondamnita al malliberejo kaj 1000 vipfrapoj pro apostazo malgraŭ ke li ne forlasis islamon; lia "krimo" estis diri, ke ĉiuj havu kred-liberecon kaj ke islamo ne havas la respondojn al ĉiuj demandoj. Li ankoraŭ sidas en malliberejo – lia edzino fuĝis al Kanado kun iliaj tri infanoj. Menciindas ankaŭ, ke en Sauda Arabio ateismo estas laŭleĝe traktata kiel formo de terorismo. Sed eĉ en pli liberalaj landoj kiel Tunizio kaj Libano okazas persekutado, diskriminaciado kaj mistraktado de ateistoj kaj ankaŭ aliaj, kiuj iel ofendas la religian ordon. Krome, ili frontas kondamnadon kaj izoladon de siaj propraj familioj, socian ostracismon, perdon de laboro, minacojn, kaj atakojn fizikajn kaj parolajn de religiuloj. Tial multaj arabaj ateistoj aktivas kaj esprimas siajn opiniojn ĉefe sekrete en retaj grupoj de samideanoj.

Estas malfacile diri ĉu Mezoriento kaj Nordafriko estas survoje al eŭrop-stila sekulariĝo kaj demokratiĝo kun libereco de kredo kaj egalaj rajtoj por ĉiuj religioj kaj mondrigardoj. Verŝajne ankoraŭ kelkaj jardekoj estos bezonataj por atingi tion. Sed intertempe ni ateistoj tutmonde devus subteni diversmaniere la liberpensulojn de tiu regiono.

*Artikolo preparita surbaze de diversaj anglalingvaj retaj fontoj inkluzive de National Interest, Deutsche Welle (angla retejo), The Guardian, Equal Times, Psychology Today, WION kaj Al-Monitor.*



# Surpriza sekulariĝo en Irano: resumo de enket-rezultoj



*Bazaro en Tehrano (AP Photo / Ebrahim Noroozi)*

Eĉ pli miriga ol la rezultoj de la enketo farita en arabaj landoj, pri kiu temis la antaŭa artikolo, estas la rezultoj de enketo pri Irano farita de la nederlanda organizaĵo GAMAAN (Group for Analyzing and Measuring Attitudes in Iran – Grupo por la Analizado kaj Mezurado de Sintenoj en Irano). Laŭ la enketo, 47% da irananoj estas ŝanĝintaj sian mondrigardon de religia al nereligia. Tio estas eble la plej frapa el multaj frapaj eltrovoj de la enketo, kiujn ni resumos ĉi tie.

La enketo titolita "Sintenoj de irananoj pri religio" estis farita en junio 2020. Pli ol 50 000 personoj estis enketitaj, el kiuj ĉirkaŭ 90% loĝis en Irano. Tiuj loĝantaj en la lando estis de ĉiuj provincoj kaj de urbaj kaj kamparaj distriktoj. La enketo estis farita rete, tiel ke respondantoj povis partopreni anonime kaj senti sin pli sekuraj esprimi siajn verajn opiniojn ol telefone aŭ vid-al-vide. Jen resumo de la rezultoj:

- 78% de la enketitoj kredas je Dio, 37% kredas je vivo post morto, 30% kredas je ĉielo kaj infero, 26% kredas, ke ĝinoj ekzistas, kaj 26% kredas je la alveno de Savonto. 20% ne kredas je iu ajn el la supre menciitaj.
- Dum 32% identiĝas kiel ŝijaismaj islamanoj, 9% identiĝas kiel ateistoj, 8% kiel zoroastranoj, 7% kiel "spiritemuloj" (t.e. homoj, por kiuj spiritaj aferoj

- gravas), 6% kiel agnostikuloj, kaj 5% kiel sunaismaj islamanoj. Aliaj deklaris, ke ili identiĝas kun Sufi-mistikismo, humanismo, kristanismo, bahaismo aŭ judismo, inter aliaj mondkonceptoj. 22% identiĝas kun neniuj el la ĉi-supraj.
- Preskaŭ duono (47%) raportis, ke ili perdis sian religian kredon. Aliflanke, 41% ne raportis signifajn ŝanĝojn en siaj religiaj aŭ nereligiaj opinioj dum la vivo. 6% diris, ke ili konvertiĝis de unu religia orientiĝo al alia.
- 60% raportis, ke ili ne preĝas, dum la restanta 40% malsamis en sia raportita ofteco de preĝado – el tiuj ĉi, 27% raportis, ke ili preĝas kvinfoje tage.
- 61% venas de familia medio karakterizata de kredo je Dio kaj religieco, dum 32% raportis, ke ili kreskis en familio "kredanta sed ne religia". 3% kreskis en "nekredanta" aŭ "kontraŭreligia" familio.
- 68% de la enketitoj opinias, ke religiaj preskriboj ne estu parto de la ŝtata leĝaro, eĉ se kredantoj havas parlamentan plimulton. Tamen 14% opinias, ke la leĝaro devas senescepte akordi kun religiaj preskriboj.
- 71% opinias, ke religiaj institucioj devas respondeci pri sia propra financado. Aliflanke, 10% opinias, ke ĉiuj religiaj organizaĵoj, sendepende de sia kredo, devus ricevi registaran subtenon, dum 3% pensas, ke nur islamaj institucioj rajtu ricevi tian avantaĝon.
- 41% opinias, ke ĉiuj religioj devus havi rajton je publika varbado, dum nur 4% opinias, ke tiu rajto estu ekskluzive rezervita por islamanoj. Tamen 43% subtenas ĝeneralan malpermeson kontraŭ ĉia religia varbado.
- 56% ne volas, ke iliaj infanoj ricevu religian edukadon en la lernejo, sed 54% aprobas, ke iliaj infanoj havu la ŝancon lerni pri diversaj kredoj en la lernejo.
- 58% tute ne kredas je la hiĝabo (vualo kovranta la hararon). 72% kontraŭstaras la devigan hiĝabon, dum 15% subtenas la leĝan devon porti la hiĝabon publike.

Do, oni vidas, ke irananoj havas forte sekularajn sintenojn, kun grandaj procentoj kontraŭ enmiksiĝo de religio en politiko, religia edukado en lernejoj, publika financado de religioj, kaj deviga uzado de la hiĝabo, dum ili favoras aŭ egalajn rajtojn pri varbado aŭ malpermeson kontraŭ varbado. Ankaŭ rimarkindas, krom tiuj 47% jam menciitaj, ke nur 37% identiĝas kiel islamanoj (39% se oni inkluzivas sufiistojn) en lando, kie oficiale 99.5% estas islamanoj. Se oni aldonas la 22%, kiuj ne identiĝis kun iuj ajn el la indikitaj grupoj, al ateistoj kaj agnostikuloj, ni alvenas al 37%, precize la sama procentaĵo kiel islamanoj. Supozeblele la cifero 47% inkluzivas tiujn, kiuj nomas sin "spiritemuloj" aŭ "humanistoj", kaj almenaŭ parton de la kategorio "aliaj".

Kompreneble en teokratia, netolerema ŝtato kiel Irano, kie senreligieco ne estas akceptata kiel identeco kaj apostazo estas mortpunebla, nereligiuloj devas kaŝi sian nereligiecon. Verŝajne se oni demandus iun nekonaton en la strato en Irano, tiu dirus, ke li/ŝi estas islamano. Espereble dum la sekvontaj jaroj venos la tago, kiam ne plu necesos kaŝi sian nereligiecon en Irano, kaj tiu lando fariĝos moderna, sekulara ŝtato, kie ĉiuj havos kred-liberecon.

*Teksto preparita de la redakcio de Ateismo. La enket-rezultoj indikitaj en la punktita listo estas traduko (iom modifita kaj mallongigita) de listo publikigita de GAMAAN ĉe https://gamaan.org/2021/01/19/gamaan-iran-religion-survey-2020/*

# Raporto pri sekskrimoj de la Katolika Eklezio ŝokas Francion




*Jean-Marc Sauvé prezentas la raporton (Fonto: Globalnews.ca)*

La 5-an de oktobro, Jean-Marc Sauvé, la estro de la sendependa komisiono komisiita de la Katolika Eklezio mem por esplori sekskrimojn en ĝiaj vicoj, publike kaj solene publikigis grandegan raporton de 2500 paĝoj, kies konkludojn li diskonigis en ŝoka duhora prezento antaŭ la amaskomunikilaro, politikistoj, asocioj de viktimoj, kaj katolikaj funkciuloj.

La rezulto de trijara enketo farita de grupo de 22 fakuloj el ĉiuj koncernaj kampoj (juro, teologio, psikiatrio, sociaj sciencoj, historio de religioj, ktp.), surbaze de ekleziaj, juĝejaj kaj policaj arkivoj kaj intervjuoj kun viktimoj kaj atestantoj, la Raporto Sauvé estas vaste laŭdata kiel modelo por ĉiuj landoj kaj institucioj, kiuj celas esplori sekskrimojn. Pro siaj amplekso, konkludoj kaj metodologia komplekseco, ĝi estas simple senprecedenca kaj havas neniun ekvivalenton ie ajn en la mondo.

Estus maltroigo diri, ke ekde sia publikigo, la raporto kaŭzis ŝokegon ne nur ĉe katolikaj institucioj sed ankaŭ tra la tuta nacio kaj iugrade tra aliaj landoj. De ĉiam estas publika sekreto, ke la Katolika Eklezio estas bredejo de pederastio – fakte, inter aliaj celoj, la reformmovado de Johano Kalvino jam en la 16-a jarcento intencis reagi kontraŭ la grandskala diboĉado, kiun li povis observi en la Eklezio de supre ĝis malsupre – kaj malgraŭ vasta publika konscio pri la afero, la Raporto Sauvé mirigis kaj ŝokis pro la amplekso kaj graveco de tio, kion ĝi priskribas.

Kelkaj faktoj kaj ciferoj povas doni ideon: Inter 1950 kaj 2020, 70-jara periodo, malpli ol unu vivdaŭro, 216 000 infanoj estis seksperfortitaj, el kiuj 80% estis junaj knaboj. Tio ofte okazis plurfoje dum longa tempodaŭro (pluraj monatoj aŭ jaroj) fare de proksimume 3000 predantaj pastroj kaj episkopoj (3% de la tuto), kaj ankaŭ kelkaj monaĥinoj. Kelkaj el tiuj pastroj seksperfortis centojn da infanoj. Se oni aldonas tiujn, kiuj estis mistraktitaj de laikoj laborantaj por la Katolika Eklezio (katekistoj, zorgantoj de junularaj tendaroj, ktp), la cifero pliiĝas al 330 000 viktimoj.

La tutan tempon, la katolika hierarkio, ekde la samranguloj de la krimuloj ĝis episkopoj, kardinaloj kaj papoj, inkluzive de Papo Francisko, sciis la identecon kaj krimojn de la plimulto de la ripetaj seksperfortantoj. Tamen, ili ne nur faris nenion por malhelpi ilin, sed ankaŭ aktive kaj sisteme neis kaj kaŝis la krimojn; ŝirmis kaj protektis la seksperfortantojn de publika malkovro kaj krima procesado; kaj konstante rifuzis atenti la viktimojn, kies mistraktadon ili neis kaj kiujn ili rifuzis aŭskulti.

Bedaŭrinde, ankaŭ francaj registaroj – ĉu maldekstraj, dekstraj aŭ centraj – montriĝis krime mankaj kaj nerespondecaj en ĉi tiu malĝoja rakonto. Ili neniam faris ion ajn por ĉesigi la mistraktadon. Anstataŭ alfronti la problemon, la registaroj kunkulpas pro sia pasiveco (esence totala dum tiuj longaj jardekoj) kaj ilia silento estis daŭra kaj absoluta.

Tiu daŭra indulgo kaj senhonta pasiveco signalas, ke la Katolika Eklezio ankoraŭ estonte profitos de privilegia traktado fare de ŝtato tamen konstitucie devigata trakti ĉiujn religiojn laŭ principo de strikta egaleco. Ne okazos "aggiornamento" *[ĝisdatigo, modernigo – Red.]* kaj la Katolika Eklezio estos plu dorlotata de la franca ŝtato super ĉiuj aliaj religioj.

*Traduko fare de la redakcio de partoj de anglalingva artikolo de Alain Gabon aperinta en la retejo Politics Today (https://politicstoday.org/france-report-on-sex-crimes-by-catholic-church/)*




Profesiaj akcidentoj: Hodiaŭ: La pastro

# Kvartala bandestro kontraŭ la respubliko

“La sekreto de la konfeso sin trudas al ni […] kaj, tiusence, ĝi estas supera al la leĝoj de la Respubliko, ĉar ĝi malfermas iun spacon de vortigo, libera, kiu okazas fronte al Dio,” diris ĉe Radio France Info Eric de Moulins-Beaufort, prezidanto de la Konferenco de la Episkopoj de Francio, en la tago post la publikigo de la raporto Sauvé pri pederastio en la Katolika Eklezio.

Tiu rezonado estas interesa, ĉar ĝi malkaŝas la profundajn politikajn kaj filozofiajn konvinkojn de tiu altranga prelato de la eklezio en Francio, kaj oni povas demandi sin, ĉu precize tion ne opinias multaj aliaj religiestroj. En la tempo, kiam multobliĝas kontraŭsociaĵoj kaj perfortaĵoj, atestante pli kaj pli grandan malrespekton al la leĝoj, tia kontestado kontraŭ la aŭtoritato de la Respubliko fare de altranga katolika funkciulo certe ne ŝokus la misfarulojn kaj la deliktulojn, kiuj same opinias: laŭ ili ekzistas reguloj, kiuj situas super tiuj de la Respubliko. Tiuj de la fido kaj tiuj de la krimo.

Tiel parolante ĉe nacia radio, de Moulins-Beaufort estis akrevide sagaca. Efektive se li tiel parolus sine de religia konstruaĵo, lin trafus la Artikolo 35 de la leĝo de 1905 kaj li riskus malliberiĝon: “Se parolado publike farita aŭ verkaĵo publike afiŝita aŭ disdonita en lokoj, kie okazas kulto, entenas rektan provokon al rezisto kontraŭ la plenumo de la leĝoj aŭ de la leĝaj aferoj de la publika instanco aŭ se ĝi celas ribeligi aŭ armi parton de la civitanoj kontraŭ la aliaj, la pastro, kiu kulpas pri tio, estos punata per kvinjara enkarceriĝo kaj 75 000-eŭra monpuno.” Bonŝance por li, ekstere de religia konstruaĵo, liaj diroj neniel estas deliktaj, ĉar esprim-libereco ne malpermesas publike diri ion ajn.

Sed male al tio, kion oni povus kredi, la profesia sekreto ne estas absoluta, same tiu de la kuracistoj, kiuj devas informi justec-instancojn se ili ekscias pri seksaj perfortaĵoj, kiel tiu de la advokatoj, okaze de agoj pri senspurigo de krimdevena mono. Strange nur konfeso estas profesia sekreto, kies amplekson ne limigas la leĝo. La raporto Sauvé logike rekomendas tion ripari, proponante nuligi la profesian sekretecon de la konfesejo okaze de seksaj perfortaĵoj kontraŭ neplenaĝuloj.

Senkonsidere de tiuj juraj subtilaĵoj, la rezonado de la prezidanto de la Konferenco de la Episkopoj de Francio rivelas, ke por li, kaj eble por multaj aliaj prelatoj, daŭre ekzistas, 232 jarojn post la Franca Revolucio, silenta malamikeco inter Eklezio kaj Respubliko, inter la Biblia juro kaj leĝoj demokrate voĉdonitaj de la Parlamento. Islamistoj ne alimaniere opinias, kiam ili volas altrudi la regulojn de la Korano al niaj demokratioj. Do la religia demando ne estus tiom solvita, kiom esperis optimistoj kaj naivuloj.

La leĝoj de la Respubliko devas igi sin respektataj, ne nur de la kvartalaj bandestroj, *["caïd de quartier" en la franca: temas pli la ĉefo de fia bando, kiu pensas sin grava kaj provas regi urborandan kvartalon – Red.]* sed ankaŭ de religiestroj, kristanaj aŭ islamaj, kies konvinkoj estas videble tiom politikaj, kiom spiritaj. Tiu deklaro estas des pli konsterna, ke ĝi ĵetos sur la katolikojn tiun suspekton, kiu jam ekzistas rilate al multaj islamanoj: ĉu ili vere estas fidelaj al la Respubliko? Ĉu necesos, kiel dum la Revolucio, peti de la pastroj kaj de la imamoj, ke ili ĵuru fidelecon al la civila Konstitucio?

Tiu epizodo ilustras la skizofrenion, en kiun demokratio metas ĉiujn religiojn: ĝi devigas ilin sin deklari fidelaj al materia povo, samtempe agnoskante ilian rajton kredi je spirita aŭtoritato, Dio, kiun ili metas super ĉion, kio ekzistas en la Universo. Ĝis kiu punkto la grandaj monoteistaj religioj bonvolos respekti tiun hierarkion truditan de la moderna vivo, kiu, tutvere, absolute ne estas tiu, je kiu ili en la realo kredas? Kiom longe la grandaj monoteistaj religioj daŭre respektos la sekularan, demokratian ordon postulitan de la moderna mondo, kiu tute ne estas la ordo je kiu ili vere kredas?

*Artikolo aperinta en la franca satira gazeto Charlie Hebdo (numero de 13 oktobro 2021), verkita de Laurent "Riss" Sourisseau, tradukita de* ***Janine Dumoulin (Francio)*** *kaj iom mallongigita de la redakcio.*




"Mi estas la sola dio kiun tiu ĉi domo bezonas."

# Pola virino mortis pro severa abortigo-leĝo

*Nyegosh Dube (Pollando)*




*"Eĉ ne unu pli" (PAP / Leszek Symanski)*

En januaro ĉi-jare efektiviĝis juĝo de la Konstitucia Tribunalo de Pollando, kiu deklaris, ke abortigoj de difektitaj fetoj estas kontraŭ-konstituciaj. La juĝo igis pli rigora la jam severan abortigo-leĝon, laŭ kiu abortigo estis permesebla nur se 1) la gravediĝo rezultis de seksperforto, 2) la graveda virino estas en vivdanĝero, aŭ 3) la feto estas difektita. Do, la Tribunalo forigis tiun trian permeseblan kialon por abortigo. Tion ĝi faris responde al peto de 119 membroj de la parlamento el la ĉefa reganta partio, Juro kaj Justeco (pola mallongigo "PiS"), kaj du aliaj dekstraj partioj. PiS estis premata de la Katolika Eklezio plene akordigi la abortigo-leĝon kun ties doktrino. Laŭ la partiestro Jarosław Kaczyński, infano estu naskita eĉ se ĝi certe mortos, por ke ĝi estu baptita kaj enterigita. Do, klare, katolika dogmo instigis la plirigorigon – kaj fine kaŭzis la morton de 30-jara polino nomita Izabela.

En septembro la juna virino eniris hospitalon en la silezia urbeto Pszczyna (Pŝĉina), sude de Katowice, en la 22a semajno de sia gravedeco. Pli frue tiun monaton skanoj montris, ke la feto havas multajn difektojn, tamen ŝi decidis daŭrigi la gravedecon. Sed la saman monaton, subite elfluis ŝia amnia akvo kaj tial ŝi rapidis al

la hospitalo cele al forigo de la feto. Ĉar la feto ankoraŭ havis korbaton, la hospitalaj kuracistoj rifuzis forigi ĝin, malgraŭ ke ili konfirmis ĝian severan difektiĝon kaj malgraŭ la danĝero al la patrino. Ili diris, ke ili atendos ĝis la feto mortos de si mem. Izabela sendis mesaĝon al sia patrino, ke pro la abortigo-leĝo, la kuracistoj tiel decidis, kaj ke ŝi tial frontas riskon de sepso. En sekva mesaĝo, ŝi informis, ke ŝi fartas ege malbone, havas altan febron, kaj timas, ke ŝi mortos pro sepsa ŝoko. Tragedie, ĝuste tio okazis baldaŭ poste. Kiam la feto mortis, la kuracistoj decidis fari cezaran sekcon, sed survoje al la operaciejo, Izabela mortis, postlasante edzon kaj naŭjaran filinon.

La advokatino de ŝia familio publikigis la aferon malfru-oktobre. Jam la 1-an de novembro, la Tagon de Ĉiuj Sanktuloj, grava katolika festotago en Pollando, kiam milionoj vizitas tombejojn, kie kuŝas iliaj familianoj, okazis grandaj protestoj en multaj urboj kontraŭ la abortigo-leĝo kaj la mortigo de Izabela pro la leĝo. Denove la sekvan sabaton dekmiloj da manifestaciantoj plenigis la centrojn de polaj urboj. Ilia slogano estis "Ani Jednej Więcej!" – "Eĉ Ne Unu Pli!"

Jam la trian fojon en la lastaj kvin jaroj okazas grandaj manifestacioj en Pollando rilate al abortigo. Antaŭ unu jaro finoktobre centmiloj ariĝis en multaj urboj kaj urbetoj por protesti ĝuste tiun decidon de la Konstitucia Tribunalo, kiu rezultigis la morton de Izabela. La bulteno raportis pri tio ĉi en la numero de novembro 2020. Kaj kvar jarojn antaŭe, en septembro 2016, okazis amasprotestoj kontraŭ leĝ-propono por plena senescepta malpermeso de abortigoj kaj enkarcerigo de virinoj, kiuj abortigas. Pro la protestoj, la leĝpropono estis retirita. Sur la kovrilo de nia novembra numero tiujare aperis foto el la protestoj kaj interne artikolo pri ili.

La kazo de Izabela estas simila al fifama kazo en Irlando. En Galivo, tri monatojn post Eŭropa Esperanto-Kongreso en tiu urbo en 2012, mortis 31-jaraĝa hindino nomita Savita Halappanavar. Dum la 17a semajno de sia gravedeco, ŝi eniris hospitalon pro komplikaĵoj rilate al la gravedeco – sekve elfluis ŝia amnia akvo sed ne okazis spontana aborto. Ŝi kaj ŝia edzo petis la hospitalon fari abortigon, sed la hospitalo rifuzis pro la tiutempa abortigo-leĝo kaj rezulte ŝi suferis sepsan ŝokon. Pro la tutlanda kolero pri ŝia sensenca morto, nacia movado estis lanĉita por forigi la abortigo-leĝon kaj fine ĝi sukcesis okazigi referendumon en 2018: du trionoj voĉdonis por nuligi la enkonstitucian malpermeson. En la bultena numero de majo 2018 aperis bildo de Savita sur la kovrilo kaj artikolo pri la referendumo, en kiu la redakcio notis, ke "pro katolika dogmo enleĝigita… Savita ne estis savita". Ĉu tia referendumo, kun tia rezulto, iam okazos en Pollando?

La familio de Izabela komencis leĝan proceson kontraŭ la hospitalo, akuzante la kuracistojn pri krima misago, sed ilia advokatino prave kulpigas antaŭ ĉio la abortigo-leĝon, kiu havas frostigan efikon sur kuracistoj. La hospitalo

insistas, ke la kuracistoj faris ĉion eblan kaj ke iliaj decidoj estis faritaj pro zorgo por la patrino kaj la feto. Ili tamen aldonis, ke ĉiuj decidoj atentis la leĝajn devigojn validajn en Pollando – jen klara agnosko, ke ili timis la abortigo-leĝon. Kaj la registaro tute rifuzas akcepti sian kulpon kaj respondecon pri la efektiva murdo de Izabela pere de ĝia barbara abortigo-leĝo. Anstataŭe, ĝi kulpigas medicinan eraron, kiu laŭ ĝi tute ne rilatas al la leĝo, kaj asertas, ke abortigo por savi la vivon de Izabela estus laŭleĝa. Sed klare, pro la juĝo de la Konstitucia Tribunalo, abortigo de difektita feto estas krima ago. Verŝajne la kuracistoj timis, ke ili ne povos pruvi, ke ekzistis vivdanĝero por la patrino, do ili decidis ne forigi la feton antaŭ ol ĝi mortos nature.

La hospitalaj kuracistoj ne devintus fari ion ajn, kio povus endanĝerigi la vivon de la virino. Ili ne devintus timi, ke poste ili ne povos pruvi, ke abortigo estis necesa por savi la virinon. Sed ili malatentis tiun danĝeron kaj nur fokusiĝis pri evitado de enkarcerigo pro kontraŭleĝa abortigo de difektita feto. Jes, ili ja kulpas kaj meritas kondamnon al malliberejo pro medicina misago, kiu kaŭzis mortigon. Sed krom ili, ankaŭ ĉiuj, kiuj respondecas pri la nuna leĝo, respondecas pri murdo – la juĝistoj de la Tribunalo, la estroj kaj parlamentanoj de PiS kaj aliaj dekstraj partioj, kaj la Katolika Eklezio. Finfine, estis religio, kiu mortigis tiun kompatindan junan virinon.

*Artikolo verkita surbaze de raportoj de BBC, Reuters, DW, Onet.pl, ABC.net.au kaj aliaj fontoj.*



*Protesto post la morto de Iza (Dawid Zuchowicz / Agencja Wyborcza.pl)*

# ATEISMO

## ENHAVO

**Vorto de la Redaktoro**

**Ateisma Vivo**

ATEO denove kunvenis virtuale sed vigle 3

Ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca sen religio?

(6 kontribuoj) 5

Tiel mi fariĝis ateisto 10

La Holokaŭsto igis ŝin ateisto 11

**Pripensigoj**

La dilemo de liberala kristana teologio 13

Pri religio, moralo kaj moroj 14

**Ĉirkaŭ la Mondo**

Kreskanta nereligieco en la araba mondo 16

Surpriza sekulariĝo en Irano 19

Raporto pri ekleziaj sekskrimoj ŝokas Francion 21

Kvartala bandestro kontraŭ la Respubliko 23

Pola virino mortis pro severa abortigo-leĝo 25

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Lingva kontrolo: Anna Lowenstein, Britio
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Konto: ateo-y ĉe UEA